

POPOLA FRONTO

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
 REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

NOVA ETAPO EN LA KALVARIO

La du grandaj demokrataj nacioj de Eŭropo, dum la unuaj flamoj de la incendio, kredis—aŭ ŝajnis kredi—erare, ke en Hispanio ekbatalis du bandoj da civitanoj pro politika aŭ religia malakordo. En la komfortaj salonoj de kancelarioj, oni donis rajtojn de normalaj militantoj al perfidaj generaloj, kiuj eĉ ne meritas komparon kun la klasikaj banditoj el montaro de la pasinta jarcento. Samrajtigi perfidulojn kun legitima registaro estas vualita ofendo, kiun ni ricevis de nacioj al kiuj ankoraŭ ni donas nomon je amikoj. Al ilia stranga cerbumado apartenas la ideo pri rigora kontrolo, sub masko de nobla intenco. Tiu oficiala internacia inspektado estas fakte malfavora baro por nia defendo ĉar Anglio k Francio zorgos ĝentile pri la ribelintoj, dum Germanio k Italio, kies ŝipoj bombardis urbojn k alportis soldatojn, deĵoros ĉe la lojalaj maroj, ne kiel senpartiaj observantoj sed kiel cinikaj malamikoj ludante farson deziri eviti konflikton, kiun ili mem provokis.

La ribelintoj povas fidi absolute je la kavaliro de la demokrataj kontrolintoj. En nia zono, neniu detalo estas garantio ke la revizoroj ne sekvos la ruzan taktikon apogi la piratajn atakojn al niaj havenoj laŭ privilegio de fripona policisto, kiu estas samtempe ŝtelisto...

Por doni al la kontrolo etikan aspekton, oni ĵus multobligis la liveron, al faŝistoj, de armiloj k municioj. Dum kelka tempo do, ne urĝos al la fremdaj mastroj malobeadi la kontrolon! La faŝistaj tiranoj postulos, k observos mem rigore, la plenumon de l' akordo por tiel malfaciligu nur la situation de la registaro en laciga penado eviti la rabon de siaj rajtoj.

Jene statas la afero; ni nepre devas akcepti ĝin tia, kia ĝi estas. Ne ekzistas kaŭzo nek deziro por prezenti nin al la mondo kiel ploremanto aŭ suferanta popolon kun la celo vekti kompaton. Estas preferinde, en tiu nova etapo de nia kalvario, transformi en kuraĝon la ofendojn, kiujn unu post alia ni ricevas de la Demokratio. La hispana ministraro, respondeca kapo de civitanaro, estas preta elteni digne k brave la batojn k sekvojn de ĉiuj rafinitaj malhelpoj de ŝtataj superuloj, surdaj k blindaj antaŭ la sentoj k fervoroj de siaj propraj samnacionoj, kiuj finfine estos la solaj viktimoj.

Hispanio dum mallonga, sed gravega, tempo lernis multe, ĝi akiris jam sperton pri la fakto ke estas neeble efektiviĝi normale, evolue, la rekta partopreno de la popolo en la publika vivo laŭ paca k honesta maniero. Ne sufiĉas havi la pravon, estas necese ankaŭ posedi kanonojn, tankojn k eĉ venenajn gasojn k tute ne doni valoron al solenaj promesoj nek al formalaj traktatoj. La juro internacia, la leĝoj de socia kunvivado, ĉiuj moralaj fruktoj de la vera civilizo pereas, detruigas per la bomboj aŭ per la hufoj de la modernaj hordoj, kiuj povas invadi landojn k ekstermi rasojn kiel dum la tre nebulaj tempoj en komenco de la homa historio.

Kun plena konscio de nia rolo ni eniras la novan etapon, atendante plian baron se tiu lasta ne sufiĉas por la fia celo eviti sukceson de la pravo.

Ni luktas por ŝiri vualojn, ni luktas pasie por venkil en kies fervora deziro, estas karesa iluzio la espero, ke se la ŝtataj gvidantoj de landoj, kun famo pri demokratio, senhonorigas postenon, la popolo mem de tiuj nacioj saltos kuraĝe sur ilin por veni lavange al niaj brajtoj k al niaj brustoj en grandioza ĉirkaŭpremo. Se tiu iluzio, sopiro en espero, krevas senbrue, kiel sapa veziko, tiam iru jam tra la mondo la funebra agnosko ke la Faŝismo devas venki ĉie, ĉar almenaŭ ĝi havas k uzas sen hezito la virton de la aŭdacol

Kun la kontrolo aŭ malgraŭ la kontrolo tuta popolo staras kuraĝel

Deka Numero!

En angora dato, kiam plej furioze atakas la faŝismo internacia en Hispanio, jubileas sobre nia gazeto pri sia deka numero.

Ĝi naskiĝis en plena tragedio, en mezo de nuboj de milita atmosfero, kiel frukto de kuraĝa iniciatemo starigi rektajn rilatojn inter la esperantistaj popoloj por vekti ĉe ili atenton pri la signifo de nia lukto.

Prezento de kolekto kun deko da numeroj estas oportuna okazo por intime rakonti pri la gazeto mem iomete: Ni ĉiuj, kiuj entreprenis la zorgojn de tia eldonado, vivantaj malsupre, kiel aktiva parto de klaso humila, konas sufiĉe profunde la inklinojn k sentojn, dezirojn k volojn de nia frataro tutmonda. Sen ia dubo k... sen ia mono, ni adreŝis la voĉon, kun sincera akcento, al konata kampo.

Kontraŭe al la opinio de multaj samlingvanoj, ni ne multe fidis je la oficialaj instancoj por la efika sukceso de Esperanto; uzante, kun aliaj vortoj, la sencon de fama proleta devizo, ni kredas, ke «la sukceso de Esperanto dependas de la esperantistoj mem»; fidelaj al tiu principo ni eklaboris sekure k firme.

Eble aŭ certe, post modesta oferto de nia speciala lingvosocio, en iu ajn ministeria sekcio, konsiderante la efikon de eksternacia informado kiel plian ĝeneralan servon, oni estus doninta al ni subvencie la artefaritan nutrigilon de kelkaj miloj da pesetoj. Tiu facilan vojon ni rifuzis; ni elektis la rektan ŝoseon vivi nur per la subteno ĝentila de la verda popolo k aperi akurate, laŭ maniero ke sola rigardo al ekstera aspekto k formato, de POPOLA FRONTO estu spegulo k barometro pri la apogo, kiun ĝi ricevas de sia publiko. Ne estis erara la vojo elektita; hodiaŭ, anstataŭ almozi protekcion, en unu aŭ en alia oficialejo, ni povas eĉ donaci servojn, el internacia medio, al superaj oficistoj, kiuj kun ioma miro, devas, ne aprobi aŭ malaprobi, sed akcepti la utilon k pezon de la verko, kiun ni skribas NUR per la inko, per la TUTA inko! kiun de vi, kara leganto, favore por nia rajto profania k danke por nia lingvo bela, ofte ni ricevas.

Tri mil ekzemplerojn akuzis la presmaŝino por la unua numero. Kvin mil jam petolas, diŝe tra la mondo, de ĉi tiu deka ido. Ses paĝoj komencis, poste ili alternis kun la oka nombro, nun ni jam sciigas, ke ĉiuj numeroj aperos jam okpaĝe k eĉ kun la eblo ricevi aldonojn de bonaj surprizoj, ĉiam laŭ honesta plenumo de nia promeso dediĉi por taŭga arango de la bulteno la tutan municion.

Sugestiojn, proponojn, konsilojn, admonojn ni legas k aŭdas ajenie. La kapo estas kvazaŭ skatolo da planoj k projektoj, sed kvankam la hela efektivigo de multaj revolj, povas okazi jam morgaŭ, tiu tago apartenas al la estonto pri kies posedo ni batalas, oferante vivon, en kruela milito dum horo decida, kun la drako de l' faŝismo internacia.

La deka numero estas do nur burĝono!

◆ Hispanio rajtas nun postuli jam la respekton de la mondo! ◆

VOLONTULOJ KAJ "VOLONTULOJ" LAŬTA RESPONDO

Sajnas strange, sed estas vere, ke multaj kleraj personoj ne havas tre klaran bildon nek objektivajn opiniojn pri la origino k sekvoj de la faŝista ribelo en Hispanio, konfuzo regas multajn cerbojn ĉar, unue: la mensogoj disvastigitaj de la ribelintoj, kun la helpo de siaj potencaj internaciaj protektantoj, trafis multfoje la celon, k due: ĉar abundas inter la instruitaj personoj tiuj, kiuj anticipe estas preparitaj por kredi ĉiam la pravon de la reakciuloj, okaze de iu ajn konflikto kun proletoj aŭ maldekstruloj. Bedaŭrinde, tio estas evidenta, tial ke tre ofte la kleruloj apartenas al la supera klaso ĉe kiu, kun malmulte da esceptoj, simpatio al la aspiroj de la malsuperaj tavoloj ne kutimas troviĝi.

Sed ni volas vekti la atenton de la liberalaj homoj k demokratoj, kiuj ne hontas sed male, fieras pri sia komprenemo k bonvolo al la idealoj k deziroj de la laborista klaso. Ni vokas ilin helpi laŭpove al diskonigado de la simpla vero.

La fakto estas, ke en Hispanio ne temas pri disdivido de la popolo en du pli malpli samkvantaj partoj, kiuj ne interkonsentas. Nel kasto de generaloj k oficioj perfidaj, sen honoro, leviĝis per armiloj kontraŭ absolute leĝecaj Registaro k Parlamento; ĉiuj trompaj propagandoj ne sukcesis vuali tiun ĉi nekontesteblan fakton. Sed estas ankoraŭ necese repeti la veron! La mallojalaj militistoj klopodis sin pravigi antaŭ la universala konscienco per artefaritaj argumentoj, sed neniel ili povis nei, ke ili ribelis kontraŭ tute legitima populara instanco.

Estas absoluta falsajo kredigi, ke estas kverelo inter du preskaŭ samnombraj partoj de la enlandanoj. Nur tiu dorlotita kasto de profesiaj armeanoj, en sia plimulto devenintaj de aristokrataj familioj aŭ en ties servo, kvazaŭ lakeoj de privilegiuloj, ruze preparis k zorge aranĝis la surprizan atakon, sen precedenco en la Historio.

La soldatoj estis trenataj per la

forto de la disciplino, pro la kutimo obei la ordonojn de la ĉefoj, pro la timo esti mortpunitaj; pro manko de veraj informoj pri la okazaĵoj, ĉar en la unuaj momentoj oni ĉiris al ili, ke ekzistis komploto kontraŭ la Respubliko; la afero estis prezentata al ili, ne kiel ribelo, frukto de konspiro, sed kiel defendo de la Registaro «kiu estis en danĝero per atako de fiuloj». Ĝis tia grado ampleksis la perfido de la mallojalaj armeestroj!

Tial batalas sen entuziasmo, kun doloro en la animo, tiuj filoj de la popolo; ili profitas ĉiujn ŝancojn por forkuri al niaj vicoj, spite ĉiujn riskojn por ili mem k por iliaj familianoj. Sed por ŝtopi la breĉon, por kompensi la perdojn de siaj soldatoj k por malhelpi la amasan forkuradon, la faŝistaj generaloj venigis en nian landon la fremdajn fortojn, germanaj k italaj trupoj, post elĉerpiĝo de la rezervoj de maŭroj k legianoj. Oni ja ne povas konsideri tiujn koloniajn soldatojn kiel hispanajn civitanojn.

Nun, kiam oni parolas pri eventuala retiriĝo de la eksterlandaj volontuloj, ni esprimas nian varman deziron, ke tiu onidiro realiĝu. Jes! Ni estas pretaj adiaŭi niajn amikajn k verajn volontulojn, kiuj konsistigas la internaciajn brigadojn, kiujn ni neniam forgesos, kondiĉe ke ĉe la flanko de niaj malamikoj malaperu la falsaj «volontuloj», kontingentoj da italaj k germanaj trupoj, senditaj por morti en defendo de kafenoj de la koncernaj diktatoroj. Jes! ni faru nur inter hispanoj la «civilan» militon.

Se ĉio tiel efektiviĝus, ni povus tuj promesi al la mondo baldaŭan pacon, ĉar nia venko estus simpla afero de du semajnoj. Sen alies spionado k sen timo jam pri perforto de fremdaj armeanoj, kiuj agas kiel ĝendarmoj sur la hispanaj soldatoj, la amasa forkuro al la lojala Armeo fariĝus rapida katastrofo por la perfidintoj k tuj la forto k la nombro estus en la flanko de la rajto k progreso.

Tro ofte kun bedaŭro ni konstataj, ke eĉ en kelkaj laboristaj medioj eksterlandaj oni ankoraŭ ne ĝuste komprenis la «delikatan» k specialan karakteron de nia milito.

En la februara numero de «Sennaciulo», oficiala organo de S. A. T. kun supraĵa aludo pri la tasko, kiun ni devos plenumi post la milita periodo, aperas admoneto per nia gazeto pro «nebulaj frazoj celantaj defendi la sendependecon de Hispanio». La temo meritas artikolon, kiun ni jam promesas; hodiaŭ ni dediĉas, al la redakcio de nia estimata kolego, nur kelkajn vortojn, pri kiuj ni ĝojus se ili estus ankoraŭ solvo por duboj de kelkaj ceteraj k bonaj amikoj:

Nun, en mezo de abomeno, frenezo k fajro de intervena milito, dum paso de angora etapo, kiam la venko, bedaŭrinde, ankoraŭ estas deziro avida k riskoplena celo; oni devas, por plenumi taskon POST la venko, venki unue! k certe, por gajni la militon, por detruji la faŝismon, por VENKII!, la tuta honesta hispana popolo; ĉiuj, kiuj okaze de faŝista triumfo perdis la vivon aŭ suferis la profanadon de siaj sentimentoj, ĝrugigis fratece k lukias fervore sub lojala alianco de komuna sorto.

Por fari konstruon oni bezonas grundon; pri konservo k akiro de tiu grundo, necesa tereno kie povi masoni materie, laŭ venko aŭ fiasko, ĉu liberan ĉu sklavecan socion, temas absolute la hispana epopeo.

Por defendi materiajn k moralajn faktorojn, kun reciproka respekto al la diversaj opinioj, batalas en sama vico k mortas kune en sama tranĉeo: marksistoj k senŝtatanoj, proletoj k etburgoj, katolikoj k ateistoj, katalunaj k basakaj naclistoj kun ĉiuspecaj internaciistoj k sennaciistoj; sen atento ĉu tio koincidas kun ajna paragrafo de ajna programo. Tamen jen do fakto por ni tre saluinda ĉar libervola popolo unueco, *sub popola komando*, ne jam estas revo, sed mirinda realo, pli forta k utila ol ĉiu subtilaĵo de obstina skolastika rezonado...

Nia gazeto POPOLA FRONTO, sen pordo fermita al ĉiu antifaŝisto, estas klara internacia parolilo de tiu multifaceta amasego, kiu, per armilo k ne per teorio, lukias kontraŭ la faŝismo de Italio k Germanio invadinta la landon hispanan, fakto konkreta, kiu pravigas, almenaŭ por atentinda nombro da batalantoj, la konvinkon ke nia milito ne estas civila malakordo sed problemo de nacia sendependeco.

Nia tasko specifa estas objektivie informi k aroge pravigi la lukton de tuta popolo. Se la nuda vero estas argumento por forblovi la blufojn de faŝista propagando; la redaktoroj diverŝtendecaj de ĉi tiu modesta buleno, observante la faktojn interne de propra medio, malgraŭ siaj privataj inklinoj k emoj, je la servo de la libero, neniam silentos!

En Valencio okazis imponega manifestacio por atesti al Registaro plenan obeon al ĝiaj deĉidoj. La urba esperantistaro, sub la verda k ruĝa makuloj de siaj standardoj, ĉeestis multenombre por publika elmonro de konsento kun la deziro de l' popolo. En la bildo aperas nia Grupo, kun flagoj k afiŝoj, dum paŝado sur ponto. La verda parado alliris scivolemajn rigardojn, kun atento k simpatio, de la loĝantaro k de la Registaro.



Gaja hundo- tra la parapetoj

FRAGMENTO DE LETERO

La milito estas tre serioza afero, sed la batalantoj ĉiam troviĝas bon-humoraj. Ĉar ne ĉiuhore ni havas pafojn, ni pasigas la tempon ŝercante, eĉ kun la malamiko! Mi rakontu do, hodiaŭ, al la legantoj de la simpatia gazeto POPOLA FRONTO, per kia bagatelo ni amuziĝis dum lastaj tagoj.

Niaj «najbaroj» de la «kontraŭa trotuaro», je okdek metroj de niaj tranĉeoj, havas tre belan hundon. Ni nomis ĝin «Franko» k verŝajne la hundo eble estas nomata iel simile, ĉar kiam ni alnomas ĝin, la petolema besto movas la voston, pintigas la orelojn k-startas. Tial ke ni scias, ke ĝiaj mastroj sufiĉe malsatas, ĉe la manĝoj ni ĵetas al ĝi pecojn da viando, pano k ostoj. La besto estas saĝa; ĝi elmontras la kapon de sur la rando de la parapeto, kuŝas sternite k subite eksaltas, kaptas kion ni elĵetis k forkuras engluti ĝin trans la ŝirmejo.

Neniu pafus kontraŭ la hundon; sed, ja ni volis forpreni ĝin al la faŝistoj. Por realigi tion ni ĵetis la manĝojn ĉiufoje pli proksime de ni por gajni konfidon kun «Franko»-hundo. Sed, kiam ni metas la manĝojn tro proksime, la hundo timiĝita, eble pro tio, kion ĝi aŭdas ĉe la faŝistoj pri la «ruĝuloj», forkuras al la parapetoj, kuŝiĝas k, sekura, alrigardas nin por se ni sendas ion. Kiam pafoj sonas, ni ne vidas la hundon, sed, hieraŭ, finfine, «Franko» falis en niajn manojn. Kian ĝojon ni havis! Eĉ al Madrido alvenis la novaĵo ke ni estas kaptintaj Frankon! Kaj tamen estis verel «Franko» estis sub nia kontrolo.

La «najbaroj» trege alarmiĝis k komencis pafadi, pli kolera ol se ni estus kaptintaj la veran Frankon. Duonhoron daŭris la «skandalo» ĝis kiam ni redonis la hundon, bone manĝinta k trinkinta k kun unu ruĝa kravato en kiu ni skribis:

«Ni redonas al vi «Frankon», ĉar ĝi estas kuraĝa kiel homo. Klopodu venigi kun vi la alian Frankon kiu kaŝiĝas kiel hundo k ni ĵetos kaptosnuron, sed... ni ne resendos lin.»

Post iom da tempo ni ricevis «ŝtonan telegramon» kiu tekstis jene:

«Tre dankaj pro via afabla regalo al «Franko». Se venus la alia k vi povas ĉasi lin, ni petas ne resendi lin al ni. Antaŭdankon!»

SAGETOJ SEN MALICO

● La tuta mondo konas centojn k centojn da fotografiaj, montrantaj la ruinojn el Madrido. Miloj da konstruaĵoj estas tute sternitaj. Tamen, generalo Von Franko cinike deklaris, ke li ne konkeris la ĉefurbon ĈAR LI NE VOLAS DETRUI ĜIN.

Kaj la demokrataro tutmonda ne levigas abrupte kontraŭ tiu monstro!

● Lää «Le Petit Parisien», cirkulis onidiro, ke la italoj enigis en Hispanion venengasojn. «Tiaj gasoj—diras tiu ĵurnalo—rapidigis en taŭga momento la italan venkon en Abisenio. Ni esperas, ke temas nur pri onidiro. La malfeliĉaĵoj de la hispana logentaro jam estas sufiĉe grandaj por ke oni faligu sur ĝin tiun novan plagon k la itala nacio havas koncepton tro altan pri homeco por toleri, ple eŝti kulpa pri uzado de tiom barbara detruigilo.»

Je la nomo de la venkitaj abisenoj, ni hispanoj, eventualaj viktimoj de novaj gasatakoj, protestas kun indigno pri tiu stranga paragrafo, laŭ kiu, kiam temas kontraŭ Abisenio, tiu militprocedo estis aprobinda sed se temas kontraŭ hispanoj estas neeble akcepti ĝian eblecon ĈAR ITALIO HAVAS TRO ALTAN KONCEPTON PRI HOMECO. Nur mankis al ni konstati tiun flataĵon, al la Faŝismo, de la civilizitaj demokratoj.

● Finfine efektiviĝos la plano pri Kontrolo.

Unue, la demokrataj potencoj blokadis nin per la Akordo pri Ne interveno. fama elpenso de nia ŝatata najbaro S-ro. Leono Blum.

Nun la efektiva blokado al nia lando estas fakte, rekta interveno, PER KIU ONI PLIFIRMIGAS ABSURDAN EGALIGON KUN LA FAŝISTAJ INVADINTOJ. Tiu spektaklo pravas, ke certaj etikaj principoj falis jam en rubejon.

● Estas fakte ke, la ribelintoj havas la simpatian de Italio k de Germanio, ili ricevadas el tiuj nacioj armilojn k militrimedojn.

Intertempe, la simpatio de la demokrataj registaroj regalis nin per embargo de militiloj. Post agnosko de la bandestraro de Burgos fare de Germanio k de Italio, la amasaj ekspedoj de fremdaj trupoj al niaj «naciistoj» skandalis la mondon, escepte la flegman Lordon Plymouth.

Sekve de tiu skandalo, niaj simpatiantoj fermas la hispanan pardonon al niaj internaciaj amikoj, la aŭtentikaj volontuloj venantaj spontanee al niaj vicoj.

Ĝen la klara signifo de la malpermeso:

Se faŝismoj sin interhelpas tiel k demokratioj bojkotas demokraton, tio simple pravas, ke ekzistas pli da solidaro inter la lupoj ol inter la ŝafoj... aŭ ke estas ŝafoj kies agado ŝajnas lupa.

● Ni, per tiuj sagetoj, ne aludas la popolojn, sed la registarojn. Nur en du landoj kunfandiĝis, favore al ni, la popolo k la ŝtato: Sovetio k Meksikio!

Post nia deklaro, povas la krenenoj ĉikani ke ni estas komunistoj. Sed ambaŭ estas la solaj landoj, kie la sento pri homa digno, koncerne la hispanan aferon, estas realo k ne objekto de makiavelismo.

Kanajla sistemo

En la tuta mondo jam estas bone konataj la fotografiaj de infanaj kadavroj, senkulpaĵoj viktimoj de faŝista bombardado al hospitalo de Getafe, apud Madrido. Tiun murdon faris la germanaj aviadistoj de Franko la 4. de lasta novembro.

La fotografiaj de la 90 infanoj, kripligitaj pro faŝista mitralo, estas ja konataj en la grandaj aŭropaj urboj, kiel plej teruriga atestilo pri krimaj agoj de hispanaj ribeluloj.

Malgraŭ multaj evidentaj pruvoj, germanoj plenumis la plej senhontan k cinikan agon, kiun iam oni povis koni en gazetara historio.

Gazeto «Stuermer» aperigis la 6. Februaro, artikolon sub jena titolo: «La sanga soifo de talmudistoj». Tiu artikolo estas ilustrita per tri foto-

grafaĵoj de infanoj murditaj de la hitleraj bomboj en Getafe; malsupre tekstas enskribo «la infanoj de naciistaj familioj ankaŭ estas murditaj de l' ruĝuloj». Kiel origino de la foto, oni citas pri «Arkivoj de Stuermer».

La artikolo diras, ke Talmudo ordonas al hebreoj la nepran murdon al ĉiuj nejudoj k, ke tiu ordono estas nun plenumata en Hispanio.

Germana leganto, vere kortuŝata pro vido de tiel impresigaj fotoj, ne povas diveni ke temas pri rektaj viktimoj mem de germanaj aeraj atakoj. Eĉ pli malsupre, en sama artikolo, oni diras per dikaj literoj «La judo venkas per la mensogo sed mortas per la vero».

La gazetoj, submetataj al hitlera imperiismo, ekspluatas malamon al hebreoj k informas tiele germanan polon! La honesta opinio respondu...

Kroniko de Konservativa Observanto

Senpartia komentario, fluinta el nedubebla fonto, venas al niaj manoj. Ĝi estas raporto, objektive verkita de Ebbe Menck, speciala sendito de grava konservativa ĵurnalo «Berlingske Tidende» el Kopenhago (Danio). Tiu raportisto akompanis faŝistan stabon dum kelkaj monatoj, k al lia plumo, apartenas la patosa priskribo, kiun ni prezentas al internacia legantaro, por studo, medito k ampleksa disvastigo.



Internacia popolano: Rigora kontrolo, je nomo de paco, estos certe nova por la hispana popolo. Kontrolu vi mem la kontrolon de via registaro!

Estas du solvoj por atingi konkeron de urbo: per rapida atako aŭ per sieĝo. La atako al Madrido plene fiaskis en la unua momento. La soldatoj de Franko jam estas kvar monatoj antaŭ la pordoj de la fama urbego k tamen la defendo ankoraŭ brave persistas; la ĵuse alvenintaj germanaj trupoj neniel sukcesas rompi la registarajn limojn.

Antaŭ kelkaj monatoj komencis ĉi tiu sangoplena lukto, kiu detruas la landon. La 15. Julio alvenis en Maroko, el Kanariaj insuloj, generalo Franko, kiu vojaĝis per aeroplano financita de la direktoro de konservativa ĵurnalo «A B C»; li facile ekmovis la danĝeran maŝinon de milito. La naciista armeo komencis ofensivon sed Franko ne estas generalo laŭ ortodoksa koncepto. Li gajnis meritojn sur batalkampo, sed liaj ideoj pri militado ne estas ĉerpitaj el teknikaj libroj. Li marŝas antaŭen, blinde, rekte al la celo k multfoje ne atentis la necesan zorgon pri kontakto de la armeo; kun nekredbla nescio, li riskas la eblon resti envolvita k izolita.

Tiu strategio sukcesis ĝis la atako al Madrido, sed kiam li konstatis la neebulon kapti tiun urbon kiel aliajn, li estis devigata krei novan planon.

Dum cent tagoj, mi akompanis la armeon de Franko k estas certa fakto ke miloj da fremduloj, ĉefe germanoj, italoj k portugaloj luktas sub dukolora monarkia flago. Ili partoprenas kiel «volontuloj» sed ne estas ia dubo pri tio ke tiuj trupoj estas senditaj de siaj respektivaj registaroj, malgraŭ subskribo de traktatoj.

Antaŭ ol montri ekzemplon, pri fremda partopreno en hispana milito, mi deziras aserti ke apud la ribeluloj luktas maŭroj, fremda legio, «karlistoj», armeaj trupoj k faŝistoj.

Kiel jam oni scias, estas precipe maŭroj k legianoj, kiuj plej suferis ĝis nun. Laŭ miaj informoj, ĉirkaŭ dudek mil maŭroj estas portitaj en hispanan teritorion. Oni ne povas nei ilian kuraĝon k estis grava ilia partopreno; ilia rekrutigo estis facile abunda dank' al promeso de eblo k libera forrabo.

Kelkfoje mi vidis forŝteli sisteme forlasitajn domojn. Nenion ili lasas; mebloj, vestaĵoj ktp. ĉio estis transportata al «Maŭra Borso» en vilaĝo Carabanchel kie ĉio estas aŭkcio vendata. Poste mi vidis kelkajn soldatojn en la poŝtejo, sendante al siaj familioj sumojn, kiujn oni skribis per kvar ciferoj.

Sed ankaŭ estas multaj maŭroj, kiuj pagas la aventuron per siaj vivoj. En la lukto antaŭ Madrido la procento da perdoj estis grandega; kiam Franko, la unuan semajnon de Novembro, celis atakpremi Madridon, li metis la maŭrojn en avangarda linio malantaŭ la tankoj, kiuj facile antaŭeniris en dekduaj ĝis dekvinaj grupoj. La respublikanoj defendis k konservis la poziciojn per manaj grenadoj, kaŭzante gravajn perdojn al la malamikoj. Ambaŭflanke oni luktis kun granda malestimo pri la vivo; kapitulacio estis tie absolute nekonata ideo.

Mi ne scias kiom da perdoj havis la trupoj de la registaro, sed la atakantoj perdis ĉirkaŭ 80 %, k el ili 30 % da mortintoj, eĉ kelkfoje la perdoj atingis 100 %. Kun tiom gravaj perdoj, estis neeble daŭrigi la atakon laŭ primitiva plano. Ankaŭ la generaloj de la hoka kruco estis devigataj atenti la fakton, ke en Maroko jam ne estis ĝoje ricevataj la, ĝis tiam senĉesaj, mendoj pri plujaj soldatoj.

La armeo de Franko ankaŭ sin apogis sur la fremda legio, fondita antaŭ 14 jaroj de generalo Millan Astray. Ĝi enhavis 25.000 soldatojn, bone ekipitaj; por ili la milito estas metio bone konata. En ĝiaj vicoj abundas germanoj k aŭstroj. Pro la atako al Madrido, la konata optimismo de legianoj krevis; la mitraliloj de milicanoj kaŭzis gravajn perdojn al tiuj profesiaj soldatoj.

Ankaŭ estas la «Karlista» armeo; ĝi konsistas el

Kroniko de Konse



Senpartia kon
raporto, objektiv
ĵurnalo «Berlinske
stabon dum kelkaj
prezentas al interna

40.000 volontuloj, kiuj konservas religian superstiĉon al reĝoj Karlo la V^a k Filipino la II^a. Tiuj fanatikaj batalistoj luktas kuraĝe en la norda fronto k estas la plej bonaj volontuloj de la naciista armeo; ilia rekrutiga oficejo estas en la urbo Pamplono.

Poste venas en vico la vera armeo, la regula armeo, kiu konsistas el laŭleĝe varbitaj soldatoj. Dum laste pasintaj semajnoj mi vidis grupojn ĉe Madruda fronto k ili vere ne ĝojis pro la deviga tasko.

La ribelintoj emas armilojn k uniformojn; sed la plimulto da uniformitaj faŝistoj estas ĉe la ariergardo. Hispana faŝismo burĝonis lastatempe, ĉefe pro timo; ĝia organizo imitas la germanan k italan, ili salutas laŭ faŝista maniero k multfoje rigardoj de timo akompanas la etenditajn brakojn, ĉar tie nur regas simpla dilemo: morto aŭ obeo.

La faŝista armeo jam estas nun atentinda faktoro, sed la oficioj ĵaluzas pri la estroj de «Falango», nomo de la aŭtenta hispana faŝista partio. Franko ne estas



jam populara, inter la nigraĉemizulo, post la malfeliĉa epizodo okazinta apud vilaĝo Robledo de Chavela, kie la soldatoj, erare, fusilmortigis cent dudek faŝistojn, kiujn ili kredis milicanoj. Se Franko venkus li restus inter la ambaŭflanka premado. Se la diplomatoj, la oficioj k la ekleziuloj, el kiuj konsistas la nuna kortego de Salamanka intencus regi, certe ili kverelus kun la «falangistoj».

La 7. Novembro Madrido estis en terura risko fali en manojn de Franko. Respublika artilerio silentis k faŝistoj kredis tro facile, ke ili jam triumfis definitive; ĉio estis preparita por eniri la urbon. Sed, tiu espero dromis en vento k pluvo; la vetero k subita neantaŭvidita atako de respublikaj trupoj haltigis la antaŭenmarŝon. La situacio ŝanĝiĝis tute; de tiu momento grenadoj k manbomboj ludis ĉefan rolon.

Mi spertis, treege proksime, la signojn de nova situacio. Kiam la ĵurnalistoj elektis dometon, en konata parko, kiel loĝejon por taŭga observado, malmultaj gre-

Internacia popolano: Rigora kontrolo, je nomo de paco, estos certe nova

Observanto

rio, fluinta el nedubebila fonto, venas al niaj manoj. Ĝi estas de Ebbe Menck, speciala sendito de grava konservativa «de» el Kopenhago (Danio). Tiu raportisto akompanis faŝistanojn, k al lia plumo, apartenas, la patosa priskribo, kiun ni gantaro, por siudo, medito k ampleksa disvasigo.

nadoj alvenis ĉiutage el Madrido, sed de 12. Novembro ĉiutage alvenis pluvego de grenadoj. La unua eksplodis apud niaj kapoj, la dua en la ĝardeno k dum ni fuĝis al subteraĵo, la supra parto de la dometo dissaltis. La malamiko tiam forte ekbatis.

Estas ronda fakto la fremda partopreno, kiu komencis ekde la unuaj tagoj. Naciista komando tuj konstatis, ke specialaj servoj devis esti plenumataj de fremdaj spertuloj; aviadistoj, tankistoj, inĝenieroj k aliaj teknikaj postenoj estis zorgataj pli k pli per italaj k germanoj... Kiom da fremduloj luktas nun apud la naciistoj? Mi ne povas nun difini ĝustan kvanton sed mi vidis en Sevilo: alvenon de 4.000 soldatoj, krom tankoj, kanonoj, aĉtoplanoj; ĉar jam ekzistis multego da ili k poste alvenis novaj amasoj, certe nun estas pli ol 10.000 germanoj en naciista fronto. Sed, pli ol la kvanto, kio valoras estas la profesia kapableco; la germana partopreno konsistigas la teknikan metodon, tio estas, rekta ago de Hitlera registaro por helpo al Franko.



La germanoj en Hispanio havas specialan uniformon k oni devas agnoski, ke la civila loĝantaro ne salutas ilin kun plezuro. Por la unuaj atakoj al Madrido, estis uzataj germanaj k italaj aeroplanoj.

En grandaj atakoj flugis grupe 21 aŭ 27 aviadiloj por bombardado k 50 ĉasaeroplanoj; kiam atakis la registaraj, kelkfoje estis en aero pli ol cent flugmaŝinoj. La plej grandaj bomboj jetitaj sur Madrido estas pezaj je 250 kg., ili estas germanaj kun elektra ilo por gradigi la eksplodon k ĉiu valoras ĉirkaŭ 7.000 markojn. Ĉiu aeroplano kunportis kvar grandajn krom aliaj malgrandaj. La tuta kosto de bomboj faligitaj, dum unu granda bombardado estis pli ol du milionoj da pesetoj.

La bombardadoj estis faritaj laŭ programo, escepte kiam respublikaj aeroplanoj troviĝis jam en aero, kio devigis ofte al forkuro de la «naciistoj». La aviadoj nur estas provizore instalitaj ĉar respublikanoj atakas ilin, detruĉele; tre ofte:

Hispana milito estas nauza afero, en la zonoj, kiujn

mi vizitis; la realo superas ĉian priskribon. Ĝi estas organizita murdado k apoteozo de la malkuraĝo: Fremdulo en Hispanio ne rajtas juĝi dekstran nek maldekstran flankon, ĉar nevole lia persona simpatio devojigus lin, sed li povas konstati la veron pri okazintaĵoj.

En hispana milito intervenas militistoj k civiluloj kun arda malamo pasie kreskanta. Temas pri milito de besta murdado; ĝis nun, en milito inter nacioj, la batalantoj havis la esperon postvivi en koncentrigaj kampoj. En civila milito ne estas pardono, ne estas kaptitoj; kiu falas en manojn de ribeluloj povas esti certa ke li estos fusilmortigita k multfoje tio okazas post rafinita turmentado. Miaj okuloj vidis sufiĉe por kredi eĉ kion mi ne vidis. Ĉio estas ebla en la hispana tragedio!

Oni konas bone la okazintaĵojn de urbo Badajoz; tie pereis pli ol dek mil personoj k la urbo nur kalkulis ses dek mil enloĝantojn. Kiam naciistoj konkeris la urbon oni ekzekutis amase en publikaj placoj. Mi alparolis personojn, kiuj estas devigataj kaŝi monstraĵojn, sed malgraŭ tio ili ne povis ne konfesi la veron.

Certe estas malfacile klarigi la kruelecon per kiu oni «purigis» la urbon Toledo. Mi ne volas priskribi tion, kio okazis en Hospitalo de Toledo...

Ankaŭ estas malfacile klarigi aŭ kompreni la kialon de murdo al kvin kamparaninoj, kies kadavrojn mi vidis proksime al Santa Olalla. Ili estis apud la vojo, kun vizaĝo al tero, fusilmortigitaj tra la dorso; oni diris, ke ili estis spioninoj, sed mi ne povas kredi, ke virinoj nesciantaj legi k skribi, estas danĝeraj spioninoj.

En naciista zono oni faras ekzekutojn antaŭ ol la tagiĝo. Kiam mi loĝis en Talavera multfoje mi vekiĝis pro abundaj pafbruoj; oni sendis kondamnitojn al eterno...

Tuj post la komenco de milito, multaj soldatoj aŭ gvardistoj luktis en zono kie ili troviĝis hazarde; kelkaj el ili, kaptitaj, povis atingi pardonon, sed tio okazis malofte k ili estis tuj sendataj al la fronto. Tion oni faris post mallonga, rapidega proceso. En korto de kazerne mi ĉeestis proceson ĉe la fino de Novembro. Kolono de du cent soldatoj alvenis sub gardado de maŭroj, ligitaj kvazaŭ bestoj; kelkaj ploris, aliaj montris malŝanton al faŝistoj per levitaj pugnoj. Ĉiuj estis ekzekutitaj.

La viktimoj estis enterigataj frumatene. Kiuj falis en batalkampo restis tie pluraj tagoj, ĝis haladzo; plejofte ne estis sufiĉe da tempo por enterigi ilin, oni ŝmiris la korpojn per petrolo k ili estis tuj bruligitaj. Hispanaj vojoj estas konturataj de amasoj da cindro, lastaj restaĵoj de sennomaj falintoj.

La ribeluloj traktas la falintojn kun plena indifereco. Kelkajn horojn, post eniro de naciistoj en Navalperal, mi ricevis permeson iri al la vilaĝo. En vilao kie estis ĝis tiam hospitalo, mi vidis en teretaĝa dekuon da kadavroj, tute kripligitaj pro grenadaj eksplodoj. Tio forte impresis min; tamen, en la unua etaĝo estis diboĉo k ĝojo. La venkintoj festis la triumfon, ne atentante la teruran spektaklon de malsupra etaĝo.

En naciista fronto la virinoj vigle deĵoras. En Talavera servis min iu knabino de «Falango» tiom okupata pri hejmaj bezonoj, ke mi tute ne kredis kiam ŝi rakontis, ke dum la nokto ŝi partoprenas la taskojn de ekzekuta patrolo. Tamen, mi povis konstati ke tio ne estas ŝerco.

En urboj konkeritaj, la naciistoj devigis la knabinojn iri kun ili; nur restis tie maljunulinoj. Dum ekskurso al parko apud Madrido, mi vidis kadavron de 18-20-jaraĝa knabino, tute nuda. Ŝi estis bela. Kuglo trapasis ŝian koron. Soldatoj diris al mi ke ŝi estis kaptita k fusilmortigita post perfortigo.

En la militzono, kiun mi vizitis, ne estas la diferenco nek ĝentila atento kaŭze de sekso.

ro por la hispana popolo. Kontrolu vi mem la kontrolon de via registaro!

LESIONO PRI DIPLOMATA ETIKO Estas la teksto de honesta dokumento, kiun la registaro de Meksikio ĵus publikigis por montri tutmonde, ke sia lando estas vere suverena k' sincere demokrata; jen la interesa deklaracio:

«Meksikio ne ŝanĝis la normojn de sia konduto, kiujn oni starigis kiam la legitima registaro de Hispanio, kiun prezidas la moŝta sinjoro Emanuelo Azaña, petis al nia lando militan materialon. La registaro de Meksikio daŭrigos la liveron de armiloj k' municioj, el nacia fabrikado, kiujn hispana Respubliko bezonas. Rilate la materialon el fremda deveno, nur ĝi povos eliri de la nacia teritorio, kiam la aŭtoritato de la koncerna lando esprimos konkrete pri tio sian plenan konsenton. — La Prezidanto, Lazaro Cardenas».

OPORTUNA KONSTATIGO

La supertendenca proleta organizo esperantista, tre grava, al kiu apartenas ĉiuj, kiuj laboras en la redakto de POPOLA FRONTO, observas pri nia batalo tre strangan sintenon.

Ok tre longajn monatojn daŭras la lukto en Hispanio k' ni kredas, ke nenia dubo ekzistas jam, por ĉiu konscia laboristo en la mondo, pri ĝia signifo por la tutmonda proletaro.

Tamen, la aludita laborista asocio alrigardas la okazaĵojn kvazaŭ eventojn en alia planedo, neniel tuŝantaj la intereson de la laboristaro. Ĝiaj du presorganoj apenaŭ pritraktas nian aferon, krom per etaj notoj, preskaŭ nerimarkablaj, en ĝenerala rubriko.

Ni vane atendadis ĝis hodiaŭ larĝajn raportojn, vastan agitadon, alvokon por helpo, instigon al subteno de la popola klaso en Hispanio. Feliĉe por ni, la anaro de tiu asocio ne bezonis ties stimuladon. Plejparte ĝi bone komprenis tuj sian devon, kun malmulte da esceptoj, k' ĝi staras solidare al ni per vigla sindona apogo.

Unu fojon pli, la amasoj, flankenlasante sian gvidantaron, agadas laŭ propra inspiro. Sed estas interese konstati, ke la respondeculoj de tiu asocio, kiuj kutime akuzas la gvidistojn de la laboristaj partioj k' organizoj, pri devojiĝo de la ĝusta linio, kondukas simile niaokaze, pravigante tiel, per si mem, sian malnovan tezon.

La deklaro, ke ĝiaj gazetoj nur koncize okupiĝas pri la hispaniaj okazaĵoj pro manko de rektaj informoj, tute ne sufiĉas eĉ kiel preteksto de sistema silentado. Ĉu la redaktoroj ne posedas hejme abundan novajmaterialon, por ĉerpi el ĝi interesajn raportojn? Ĉu la asocio havas nenion por komuniki, laŭ propra konto, al sia membraro en tiu ĉi grava okazo?

Ĝis nun, ni ankoraŭ ne konas la veran sintenon de la estraranoj de la organizo ĉar ili neniel eksterigis ĝin.

Kvazaŭ ne temus pri «Faŝismo aŭ popolaĵ digno k' rajto», la koncernaj revuoj ne aperigis, laŭ nia scio, ian originalan artikolon, donanta la opinion de la redakcio. En ambaŭ gazetoj speguliĝas speco de glacia indifereco pri la finrezulto de nia lukto; ŝajnas, ke la instancoj de tiu asocio rigardas la aferon kiel spektaklon aŭ kiel vetludan sportan maĉon, laŭ ia diletanta vidpunkto.

Neniam ni povis supozi, ke la klerigaj k' kulturaj kvalitoj de tiu senpartia Esperanto-Organizo atingus tioman gradon de neŭtralecpl

Kvankam ni ne deziras polemiki, ni nepre bezonis konstatigi tiun ĉi fakton, almenaŭ por trankviligi nian konsciencon de sinceraj homoj, kies konscio ne bezonas instigojn por plenumi la pezajn devojn, kiujn postulas kruele la milito, sed kies fido al efiko de principoj suferas disreŭigon en la solena horo de la kruda realo.



Atendante vidi sian bildon en la rompia spegulo, kiun prezentas la Faŝismo

POPOLA FRONTO ESPERANTISTA

Estas voko jam, por ebla k' praktika efektiva de la fama devizo pri unu granda rondo familia inter ĉiuj esperantistaj amikoj de la socia progreso. Unueco de fortoj en momento de danĝero, estas natura instinkto de vivanto. Kiel homoj ni defendos nian vivon por defendi ankaŭ nian lingvon!

Nobla krio el Anglio

S-ro. William Ross, Majoro de la Brita Armeo, sin turnis al reĝo de Anglio, per jena teksto:

«Sinjoro: La subtenantoj de la Registaro deklaras, ke la politiko de Mr. Eden estas tiu de la tuta Nacio k' konforma al niaj tradicioj. Mi devas diri, unue: ke la Ne-Interveno, kiel ĝi estas aplikata de la Registaro, ne estas eĉ parte, unuanime aprobatata de nia popolo. Due: en tio, kio koncernas nian tradician politikon, mi kuraĝas aserti la malon. La Brita Armeo batalis en la Iberia Duoninsulo, dum la hispana milito pro reĝoelekto, dum la milito por sendependo kontraŭ Napoleono k' okaze de la Karlista ribelo antaŭ cent jaroj. Tiu lasta interveno estis organizata de volontuloj k' apogata de nia Registaro. Iris al Hispanio brigado el pli ol 12.000 angloj, varbitaj k' ekipitaj por helpi la legitiman iaman registaron de Madrido.

Protekti Hispanion kontraŭ iu ajn kontraŭleĝa atako, estis ĉiam afero pri vivo aŭ morto por la britaj interesoj en la pasintaj jarcentoj. Nun, en la XX^a jarcento, ŝajnas ke la raso de Palmerston k' Pitt elĉerpiĝis. Oni konsentis al atenco kontraŭ Etiopio, kiel sekvo logika de la senrimeda forlaso de Anglio al sia politika hegemonio en Eŭropo, ĉar mankas jam kuraĝo al ĝiaj ŝtatestroj, mi ne aludas pri ilia honesteco. Via, William Ross, Majoro.

MOZAIKO

● Dum unu el oftaj luktoj apud rivero Jarama, aperis kelkaj italaj tankoj, kiuj haltigis momente niajn trupojn. Subite, eksaltis el tranĉeo soldato je kroma nomo «la kamparano» kiu per manbomboj k dinamitaj kartoĉoj atakis kuraĝe k difektis unu. Tuj aliaj soldatoj sukcesis repuŝi la aliajn. La tankoj estis devigataj al fuĝado k niaj trupoj povis daŭrigi la atakon.

● En provinco Leon, kelkaj grupoj da laboristoj fuĝis al montaro kiam, en la komenco de ribelo, ili ne povis venki la faŝistan armeon. Dum la nokto, tre ofte ili ekskursis silente k dise al malamikaj tranĉeoj por preni fusilojn. Tiamaniere ili sin provizis je armilaro k starigis novan fronton. Nun ili jam ricevis necesajn elementojn k niaj kanonoj sonis unufoje laŭ komenco de lukto en tiu provinco. Ni devigis la faŝistojn forlasi tranĉeojn k poziciojn; ili sin rifuĝis en vilaĝo La Robla, kiun ni atakas efike.

● La aŭtonoma baska regiono elektis demokratian registaron. En tiu regiono estas detruiĝinta neniu preĝejo; fervore daŭras la diservoj ĉar ne estas konflikto tie inter la respublikaj aspiroj de l' popolo k la religio. Estas granda la kvanto da pastroj baskaj, kiujn fusilmortigis la faŝistoj, ne nur la popolo ĉeestas preĝeojn sed ankaŭ multaj batalionoj, organizitaj de la «Baska Naciista Partio». La tieaj pastroj diras: «Por servi al Dio ne necesas porti armilojn; ŝajnas ke en kontraŭa flanko estas pastroj, kiuj luktas per armiloj en mano. Ni, la baskaj pastroj ne deziras lukti kontraŭ nia popolo. Aliflanke, ni nur akceptas la ekzemplon de nia episkopo».

● La maŭro Yirilli Belmonta Mohatar, 40 jaraĝa, forkuris el urbo Oviedo k rakontis plendete ĉion, kio okazas interne de la sieĝata urbo. Estas pli ol 1.500 maldekstruloj fusilmortigitaj. La fusilmortigoj sin sekvas senĉese k karceroj estas plenplenaj. Faŝistoj mensoge diras, ke la forkurintoj estas tuj mortigitaj en nia zono, sed li aŭdis el tranĉea laŭtigilo la voĉon de forkurintoj k tio instigis lin agi same k li esperas ke la aktuala fluo da forkurintoj pli k pli keskos, spite la faŝistajn minacojn.

● Angla loĝanto de Gibraltaro, kiu hazarde sin trovis en Malago, diris post sia reveno, ke la faŝistoj per ponado kontraŭ la kolo, postulis de li promeson ne rakonti tion, kion li vidis en Malago tuj post la eniro de fremdaj trupoj en la urbo. Li estis arestita en hotelo k savis sian vivon dank' al kapitano de angla militŝipo «Basilisk», kiu kun forta skorto de maristoj ŝercis lin. Sed li promesis silenton...

● Kelkaj faŝistaj aeroplanoj superflugis provincon Tarragono k serĉis

gravan hospitalon en vilaĝo Flix. La hospitalo estis tute detruiĝinta pro la bombardado kiu kaŭzis 41 viktimojn. Naŭ mortintoj k tridek du vunditoj, la monstra faŝista taktiko sukcesis!

● La 25. Februaro germana ĉasaeroplano, marko Heinkel, kondukita de germana leŭtenanto, volonte alvenis en niajn liniojn de Naval Moral. La aviadilo estas tute nova k bona el lasta modelo. Ĝi ne estas la unua k ni esperas ke ne estos la lasta.

● Ankaŭ nia provizora ĉefurbo, Valencio, estis atakata de faŝistaj aeroplanoj. Dum la atako, bombo falis sur la poŝpo de angla militŝipo «Royal Oak» k kaŭzis vundojn al tri oficiroj k maristo.

● Apud Madrido multenombra grupo da soldatoj forkuris al niaj tranĉeoj. Nur kelkaj atingis la celon ĉar la faŝistoj tuj fusilpafis al ili; kelkaj falis k la plimulto sin kaŝis en neŭtrala zono, dum la nokto niaj milicianoj portis nutraĵojn al ili k kiam tio estis eble akompanis ilin ĉe ni.

● Antaŭ du aŭ tri semajnoj komencis radiodissendoj de faŝista propagando sub la nomo «Radio Veritas» per kataluna k hispana lingvoj. Kataluna registaro povis konstati ke tiuj radiodissendoj apartenas al radiostacioj de Roma, Milan, Genova k Florencia. Tiu propagando estas kontrolata de itala registaro, kio denove pravas pri la «ne interveno» de Italio en hispanaj aferoj.

● En Orano estas publikigita grava manifesto, subskribita de kvin mil marokanoj k mil eŭropanoj, kiuj kundisidis sub prezido de Cheil Mohamed Said Zahiri. La manifesto diras interalie: «Generalo Franko haltigis la terkulturadon en hispana zono, transportante devige la maŭrojn al batal-

kampo. Ke ĝis nun, estas transportitaj 70.000 maŭroj el maroka popolo, kiu konsistas el 500.000 loĝantoj. Ke la situacio de maŭroj en Hispanio estas malbonega, eĉ rilate al nutrado. Ke la riffanoj, kiuj venas en francan zonan rakontas pri la turmentoj aplikitaj de hispanaj aŭtoritatoj al maŭroj en tiu zono kie nur restas virinoj k infanoj.

● Dum kelkaj, malmultaj tagoj, estas tri fremdaj ŝipoj kiuj ricevis karesojn de germanaj minoj. Angla «Londovory Castle», franca «Marie Therese» k greka «Lukias».

● Dum februara monato, en Delmenhorst k Bremerhaven (Germanio) estis enterigataj 22 germanaj aviadistoj, kies kadavroj venis el Hispanio per ŝipo de la Kompanio Neptuno. Faŝista gazeto «Wanderer» publikigis sciigon pri la morto de leŭtenanto Wilschik de Hindenburg, kiu luktis en Hispanio en antitanka bataliono. Sekve de tiu sciigo la germana registaro oficiale malpermesis publikigadon de sciigoj rilate al soldatoj k oficiroj mortintaj en Hispanio.

● Nia ministro de Maro k Aero anoncas ke dum februara monato, ni faligis 22 aeroplanojn faŝistajn, el kiuj unu restis ĉe ni en perfekta funkciado. La faŝistoj faligis 9 aviadilojn niajn. Kiel en januara monato, ankaŭ la bilanco estas favora al nia armeo; certe la germanoj ne multe povas fieri pri siaj armiloj.

● Faŝista generalo Cavalcanti, kiu ripozas nun en portugala urbo diras per letero al amiko loĝanta en Parizo: «Se la triumfo alvenas, ne estos la triumfo, kiun vi k mi deziras. Nia movado estas gvidata de viroj, kiuj ne komprenas kion ĝi devas esti. Se la ruĝuloj atingas la sukceson ni perdos nian patron, sed ni ne trotaksu la naciistan triumfon, ĉar ĝi apartenus al Italio k Germanio, kiuj trudos al nia popolo siajn koloniajn ambiciojn.

LA FRONTO INTERNACIA

estas ankaŭ plej grava k decida batalejo, kie la vigla pafado de nia gazeto povas helpi konkeri tre valorajn poziciojn svingante la veron kiel gloran standardon.

La metalo de via subteno estas la sola materialo por nia daŭra ofensivo kontraŭ la blufa propagando de la faŝismo universala. Via kupro superos ĝian oron.

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono

GUSTAVE FARENC
56. Rue du Parc
Poŝtekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj

PETRO van der PLANK
Van Speijksstraat, 48-1
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

POPOLA FRONTO—Mar, 25, Valencia (Hispanio)

22^a KONGRESO DE LA FEDERACIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ (EN LA REGIONO DE LA NEDERLANDA LINGVO)

NIA PUBLIKA SALUTO

La 28-29. de kuranta monato okazos en Gento (Belgio) la ĉi-jara kongreso de la laboristaj esperantistoj en la nederlandlingva regiono.

La plej laŭdinda k reliefa kondiĉo de la kamaradoj, kiuj baldaŭ kongresos, estas ilia perfekta k trafa organizkapablo. Ni, hispanoj, en nunaj tagoj tragediaj, kiam brue rompiĝas normoj k procedoj, scias la valoron de zorga metodo por efika uzado de fervoro. Je nomo do de ĉiuj hispanaj esperantistoj, laŭ sobra maniero, ni volas laŭtigi nur sincerajn dezirojn pri alta sukceso por la ĉefa kunveno de tiuj bonaj amikoj, inter kiuj nia gazeto cirkulas grandkvante kiel ŝatata familia objekto, kun plaĉa solidareco.

NIA MUNICIO

Valencia esperantistaro	48	ptoj.
A. D. — Benicásim	10	»
S. D. — Martos	10	»
FLE Sekcio X. — Amsterdam	5	guld.
F. L. — Amsterdam	10	»
Sekcio V. Grupo Zamenhofa — A-dam	3'56	»
FLE. Sekcio Zwolle	9'8	»
G. A. v. M. — Amersfors	1	»
A. S. — N. Beets N. H.	1	»
V. B. — Budapeŝt.	20	ptoj.
J. E. — Barcelono.	5	»
H. C. — Lille	10	ffr.
E. P. — Hudiksvall	25	»
J. R. — Chalons	30	»
Grupoj el Verviers	37'52	»
P. L. — Toulon.	30	»
I. H. — Marseille	50	»
E. P. — Skovde.	20	»
J. K. — Verviers	18	»
Lab. Esp. Grupo. — Nittedal.	5	ĉkr.
N. Y. a Grupo LEA-NA. — New York.	6	dol.
SAT-Londono (pere de E. M.)	27	ptoj.
E. E. Y. — Aspremont	46	»
H. N. — Malmo	25	ffr.
P. G. — Evreux	20	»
K. H. — Corseaux	48'65	»
J. M. — Liberec	37'04	»
A. F. — Hustopecce	14'81	»
A. B. — Orleáns	10	»
L. — Orleáns	0'50	»
H. P. — Orleáns	10	»
E. Y. — Jellicoe	10	dol.
Esperanto Grupo. — Karlstad	52'63	ffr.
L. M. S. Quentin	27	»
H. D. — Sancarne	16	»
P. — La Varenne	10	»
V. R. — Marseille	10	»
S. k A. Paris. — Malakoff	10	»
W. A. G. — Croydon	6	»
E. M. G. — Los Angeles	2	dol.
A. B. F. — Esperanto Klubo.	10	svd. kr.
Germania k-do	28	ffr.
Paco k Amo. — Barcelono.	14'50	ptoj.
Districto Rotterdam 2. ^a sek.	2	dol.

Niaj amikoj en Hago ne necesas sendi alian kontribuon al nia nederlanda peranto en Amsterdam, sed preferinde ili transdonu ĝin al k-do: H. J. Nieuwenhuizen, Laakhof 37 en Hago.

Du aŭ tri donacoj, kiuj aperis malbone en antaŭaj listoj, laŭ indiko de niaj perantoj, ni kvitanças ilin denove, korektiitaj.

AL SOVETIANOJ

Multaj k-doj el Soveto demandas kiel transpigi monon al nia POPOLA FRONTO por subteni ĝian eldonadon. Ĉiu tiucele kolektiita mono estu sendata plene al C. K. S. E. U. Moskvo, Spiridonovna 15.

Tiu organizo ankaŭ zorgas pri la ekspedo de «P. F.» al ĉiuj niaj amikoj el Soveto; ili do scfu pri tio!

INFORMEJO

La adreso de k-do: Galdino Roura estas: Cuartel de Intendencia, 2.^a Centuria. Barcelono.

ONI PETAS INFORMOJN PRI

Kapitano León Luango, esperantisto, kiu ribelis en Oktobro de jaro 1934 en Lérida k estis enkarcerigata en Kastleo Sta. Catalina.

K-dino Consolación Vera, kies adreso antaŭ la milito estis: Ventosa, 10. Madrid.

K-do: Jacques Bartoli, Itala Legio, kolono Ascaso, batalfronto de Huesca.

K-do Isidro Vilaplana, de Sabadell (Barcelono). Pri ĉiuj ni atendas sciigojn.

LASTHORA IMPRESO

Paralele kun la apliko de la internacia kontrolo, la faŝista potenco armeo, kiu konsistas preskaŭ nur el italaj regimentoj, atakegas, en direkto al Madrido, tra najbara provinco Guadalajara. La invadinta stabo scias pri la neeblo rekte konkeri la ĉefurbon tial sia celo estas nun sieĝadi ĝin. La streĉa volo popola deforas fiere, k prio ĝi donis ĵus plenan respondon, por fiaskigi la marŝon, kiu sajnjs estis facila. Tamen ni ne volas kaŝi la opinion, ke la nunaj momentoj estas la plej decidaj, la plej danĝeraj ne nur por la hispanoj sed por ĉiuj liberaj homoj de la mondo. Madrido estas alta simbolo, ĝi estas historie preta venki por ĉies feliĉo aŭ pereadi detruie por tutmonda honto.

AVIZO AL K-DOJ EN LA FRONTOJ

Laŭ peto de multaj legantoj, ni akceptus tre plaĉe mallongajn raportojn pri anekdotoj k travivaĵoj en la fronto por aperigi ilin en la gazeto. Ni esperas pri bona ricevo de nia propono kiu povas esti eĉ agrabla distro dum ripozo en la tranĉeo. Ekverku do tuji

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia

POPOLFRONTA LETERUJO

S. P. — Nimes: Ni notas, ke la koncerna artikolo interesas vin tial ĝi aperos en estiona numero de via gazeto.

Ŝ. P. — Mahaĉ-Kala: Kiel jam klarigite, ni ne povas disponigi lokon por anohcoj, pro manko da spaco en nia bulneto, kiu bezonas sian tutan amplekson por informa teksto.

A. S. — Voronej: En k ekster la Internacia Brigado, ekzistas multaj esperantistaj batalantoj, sed kolono konsistigata nur de esperantistoj estas ankoraŭ en embrio. Ni aperigas malmultajn bildojn ĉar «P. F.» estas malampleksa k la fotoj alprenus tro da spaco, postulata por la teksto.

T. J. — Constantine: En la koncerna fako de ĉi tiu numero, ni pridemandas vian kuzon. Ni esperas, ke estos ŝanco pri sukceso k ke oni ricevos informojn.

S. D. — Martos: Ni ricevis du numerojn de via fronta gazeteto. Pri aliaj aferoj ni skribos aparte. Koran gratulon k bonŝancon kun la kugolo!

N. O. — Ĥarkov: La petoj pri korespondado flanke de eksterlandanoj precipe el Soveto, estas amasegaj. En la nuntempaj ĉirkonstancoj estas ja malfacile plenumi tiajn dezirojn. Estonte la afero estos pli facile solvebla.

D. E. k A. J. — Karlstad: Kun ega danko ni legis vian kortuŝan salutleteron al la hispanaj virinoj. Ni transdonas ĝin al la virina revuo «Pasionaria». En okazo de publikiĝo, ni sendos al vi ekzempleron. Bonvolu transdoni nian fervoran dankon al Esperanto-klubo pro ĝia helpodonaco k por ĝia kuragiĝa letero.

Ĉ. H. — Krivoj-Roj: Ni enmetas vian demandon en la «Informejo». Eventuale ni sciigos vin. Pri la cetero de via skribaĵo vi jam vidis, ke ni klopodis atenti vian deziron.

Camesca: Kun profunda danko ni legis vian estimatan bildkarton. Akceptu nian amikan saluton.

J. L. — Pouy: Efektive trafis nin siatempe la respondukuponoj, el kiuj kvin devenis el germana k-do. Dankon al vi k al la anonima donacinto en Hillerio.

Th. J. — Gytorp: Akceptu, kara kamaradonian plej sinceran dankon pro via frateca letero kies legado donis kuragon.

R. R. R. — Melbourne: Via aprobo al nia laboro puŝas nin al plidaŭrigo de nia tasko.

W. E. P. — Middleburg: Via korespondanto J. Aparici faris bone k li diras, ke antaŭ nelonge li skribis vin. Momente ni ne povas komplezi vian aŭstrian amikon pri lia peto. Pri tiaj legantoj ni pensas emocie.

J. O. K. — Akarp: Kun atestimo ni legis vian intereasan leteron. Pri ĝia enhavo ne estu diskutoj inter ni. Vi pravas, sed malgraŭ uzado de ŝajne sensencaj naivaj diroj, la fincelo ne estas forlasita k temas pri taktiko k komprenemo de la situacio ĉiuaspekte.

S. N. — Goteborg: Pro via salutkarto ni dankas vin. Ankaŭ ni dankas pro la kolektiita mono okaze de la festo de esperantistoj en via urbo.

J. B. P. — Cowdenbeath: Via letero venis post la dato de via kunveno. Tamen ni sendis al vi materialon k skribis al vi aparte. Pri la cetero de via peto, ni esperas komplezi vin ankaŭ. Tiu laboro estas piezuro!